**Dua Bulteno**

**Dua Trilanda Kongreso,**
**Bekasi 28a marto – 2a aprilo, 2018**

Jen simpla 'dua bulteno' por partoprenontoj de la Trilanda Kongreso. Enestas gravaj informoj pri tio kion vi kunportu al la kongreso kaj kion vi povas atendi tie.
Bonvolu do atente legi ĝin.

## Pri kelkaj programeroj

### Malfermo
Bv. kunporti iom oficialajn/decajn/ne-feriajn vestaĵojn por porti tiam. Ni ankaŭ faros la grupan foton tuj post la malfermo.

### Kursoj
Okazos baza- kaj mezanivela kursoj. Ĉiuj kongresanoj rajtas aliĝi al la kurso laŭ siaj niveloj. En la fino de kurso, la kursano rajtos ricevi atestilon se li/ŝi sekvus la tutan programon.

### Aŭkcio
Okazos aŭkcio, kie vi povos tre malmultekoste aĉeti esperantaĵojn. Aŭ eble iu alia aĉetos kaj donacos al vi! Ĉiukaze la profito de la aŭkcio iros al la Indonezia Esperanto-Asocio.
Vi povus kunporti esperantaĵojn al la kongreso por aŭkcii aŭ simple por donaci, ili estas bonvenaj!

### Arta vespero
Ni havos artan vesperon, kiu kombinos la ecojn de la Internacia Arta Vespero kaj Nacia Vespero ĉe UK. Se vi scias kanti, danci, deklami ion.... bv. prepari vin kaj kunportu la necesajn muzikon, kostumon ks.

### Ekskurso
Ni havos 3 ekskursajn programerojn: antaŭkongresan ekskurson al Anyer, tuttagan ekskurson sabaton kaj postkongresan ekskurson al Balio. Aliĝu vin al Erlangga ĉe greschinov@gmail.com plejlaste antaŭ 28-a de februaro 2018, kaj pagu surloke al kasisto de kongreso, Refandi. Necesaj informoj pri la ekskursa programero estos senditaj aparte per retmesaĝo al aliĝintoj.

### Mono (informo por eksterlandanoj)
La loka mono estas rupioj. Pli-malpli 10,000 rp egalas al unu aŭstralia dolaro aŭ 15,000 rp egalas al unu eŭro. Vi povas ŝanĝi monon en la flughaveno, se vi iros rekte al la kongresejo.
Tamen, ĉar la kurzo povas esti pli bona en la urbo, vi povus trovi monŝanĝejon en Bekasi, precize en la magazeno apŭd kongresejo kaj tie ŝanĝu monon. Se vi povas preni monon el mura monmaŝino, vi same bone povas fari jam en la flughaveno.
Cirkulas moneroj de 100, 200 (maloftaj) 500, kaj 1000 rupioj. La monbiletoj valoras 1000, 2000, 5000, 10000, 20000, 50000, kaj 100000 rupiojn.

## Kiel atingi la kongresejon

**La kongresejo lokas ĉe :**

**Dua Bulteno**

**Dua Trilanda Kongreso,**
**Bekasi 28a marto – 2a aprilo, 2018**



**Hotel Horison Bekasi**
**Jalan KH. Noer Ali, Kayuringin Jaya, Bekasi Selatan 17148, Jawa Barat**

**El la flughaveno Soekarno-Hatta en Ĝakarto:**

Bonvolu trafi la buson Damri/taksion el la flughaveno.
Kosto: Rp 65.000,- (buso); Rp 300.000,- (taksio)
Dumvojaĝa tempo: 45-60 minutoj senobstakle en la vojo
Itinero: Flughaveno – flughavena impostvojo – Impostvojo de Ancol – Enurba Impostvojo de Ancol – Impostvojo de Cawang – Eliro de Impostvojo de okcidenta Bekasi – Bushaltejo de Kayuringin

**Skanu ĝin por mapo de kongresejo**

**Kion kunporti (krom la kutimaj aferoj kiel vestaĵoj ks.)?**

- Se vi aliĝos al la baza kurso, prenu librojn :
    - Kunci Esperanto (la indonezia ŝlosilo)
    - Esperanto dengan Metode Langsung (Esperanto per Rekta Metodo)
- Monon por aĉeti Kunci kaj la lernolibron 'Esperanto dengan Metode Langsung', certe se vi intencas partopreni kurson.
- Skribilojn por fari notojn, speciale se vi partoprenos kurson.
- Monon por aĉeti t-ĉemizon de la kongreso, esperantaĵojn ĉe la aŭkcio, ktp.

- Muzik(il)on, kostumon, aŭ aliajn necesaĵojn...se vi volas ion prezenti dum la Arta Vespero.

**Atentu!** En la ĉambroj haveblas littukoj, neceseja papero kaj sapo. Tion vi do ne devas kunporti. Ĉiujn aliajn higienaĵojn vi kunportu mem.

## Ĝeneralaj informoj pri Bekasi

1. Geografia situacio
   Bekasi situas pli malpli 18 km de la centro de la ĉefurbo, Ĝakarto.

2. Loĝantaro
   Bekasi havas 1,8 milionon da loĝantoj.

3. Vetero kaj Klimato
   Bekasi estas metropola urbo, kiu havas malpli varman veteron ol aliaj metropolaj urboj. Ĝi havas ekvatoran klimaton kaj kutime la averaĝa vetero tra la jaro estas 28°C. Specife en marto kutime ankoraŭ pluvas en kelkaj partoj de la urbo.

4. Lingvoj
   Bekasianoj plejparte parolas du lingvojn: la indonezian lingvon kaj la batavian. La indonezia lingvo estas la nacia lingvo de Indonezio kaj la batavia lingvo estas loka lingvo de la regiono ĉirkaŭ Ĝakarto. Kutime junuloj povas iomete paroli la anglan. En kelkaj lernejoj troveblas ankaŭ tiuj kiuj parolas aliajn lingvojn, ekzemple la francan, la araban, kaj la germanan.

5. Loka Tempo
   La loka tempo estas UTC+7, konata enlande kiel WIB (Waktu Indonesia Barat/Tempo de Okcidenta Indonezio)

6. Elektro
   La elektra kurento estas 220-240-volta. Kontaktilo estas ronda dupolusa, kiel eŭropa kontaktilo.

7. ATM (Aŭtomata monmaŝino)
   Troviĝas ĉirkaŭ la kongresejo estas granda magazeno kaj ene estas kelkaj “ATM” kiuj validas kun internacia banko per signo de “Maestro, VISA, Cirrus”.

8. Telefonado
   La landa prefikso por Indonezio estas +62, kaj la loka prefikso por Bekasi estas 021. Do, la tuta prefikso por Bekasi estas +6221. Grava telefonnumero: 112.

9. Interreto
   En la kongresejo estos senpaga sendrata reto

10. Enurba trafiko
    Estas du plej preferindaj publikaj transportiloj en Bekasi: angkot kaj reta “ojek”. Angkot (angkutan kota/urba transportilo) estas modifita aŭtomobilo, kiu povas havi ĝis 12 personoj, kaj reta ojek (ojek: motorcikla taksio) estas unuopa publika veturilo kiu povas esti mendata de poŝtelefona aplikaĵo. La plej popularaj retaj ojek estas GoJek, Grab kaj Uber. Ankaŭ oni povas mendi por veturi per aŭtomobilo utiligante la saman poŝtelefonan aplikaĵon.

**Iom da reklamo :-)**
Dum la kongreso estos aĉetebla la lernolibro 'Esperanto dengan Metode Langsung' de Stano Marcek kaj 'Kunci Esperanto', dua represo.

Prezoj: Kunci: 15,000rp por unu, sed ekde 3 ekzempleroj 13,000rp por unu.
Esperanto dengan Metode Langsung: 55,000rp por unu.
Bv. demandi al viaj amikoj en via urbo ĉu ankaŭ ili volas aĉeti unu el tiuj libroj. Se jes, kolektu la monon kaj vi povas dum la kongreso aĉeti la librojn ankaŭ por ili. Tiel ni ŝparos multajn sendokostojn.
Dankon.

**T-ĉemizo kongresa!**
La Loka Kongresa Komitato farigis kongresan t-ĉemizon. La LKK kaj la helpantoj portos ĝin en la unua tago por esti bone rekoneblaj. Tamen restas pli ol sufiĉe da en pluraj mezuroj por ke ankaŭ vi aĉetu ekzempleron por portu dum kaj ankoraŭ longe post la kongreso kaj tiel reklami pri Esperanto. Ĝi estas bona kaj utila suveniro.

Se vi bezonus alian informon rilate al via vojaĝo al Indonezio, kontaktu LKK:

Retadreso : kongreso@esperanto.or.id